

BULGARA ESPERANTISTO

TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Jarabono: 10 bulgaraj levoj,
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro
Adreso: Sofio, Poŝtkesto 233

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata
cm. Anoncetoj: 1 levo je
vorto aŭ mallongigo.

ANTAŬ LA KONGRESO

Baldaŭ la bulgara esperantistaro havos sian ĉiujaran feston — la 19, 20, 21-an de julio j. k. okazos en Stara-Zagora ĝia jara kongreso. Tiam la partianoj de unu bela lingvo, la semantoj de unu bela ideo kunvenos por frate premi al si la manojn kaj en frata atmosfero ŝanĝi pensojn: pri la vojo jam irita kaj sukcesoj atingitaj kaj pri la metodoj kaj vojoj sekvendaj por la efektivigo de la komuna idealo. Belaj tagoj dum kiuj koroj al koroj parolas kaj dum kiuj belaj sentoj ŝprucas spontane!

Eble oni ridetos kaj rediros, ke tio estas nur la dezirinda, la ideala stato de la afero — ke la medalo havas ankoraŭ unu flankon: peniga laboro, streĝigaj disputoj, ekscitigaj momentoj. Kaj... la neeviteblaj nebuliĝoj de la festhumoro. Vere, la bildoj ne estas pentrataj nur per mola koloraro — necesas ja ankaŭ krudaj, eĉ se vi volas nigraj koloroj por imponigi la belajn kaj sugestoj al ni ties valoron. Tre vere! Kaj ni ĝoju pri tio, ĉar ĝi, la cetera flanko de la medalo, pravas, ke ni volas esti pentristoj kun ties plej belaj atributoj — ni volas esti indaj kreantoj de la bela bildo

de la esperanto-movado en nia lando.

Precipe ĝojiga estas la „interfrotado de la cerboj“ dum tiuj kunvenoj. Ĝojiga, ĉar per interfrotado de la cerboj naskiĝas la ideoj. Kaj jen nun ni alvokas vin al tia cerba laboro, nun kiam ankoraŭ unu jaron ni enskribis en la flavan libron de la tempo — jaro plena je zorgoj por la enlanda movado kaj por ĝiaj gvidantoj. La aferoj de nia Asocio ne tute senknare marŝadis. Ni tion spertis, vi tion konstatis. Kaj tion vi prijuĝos en la kongreso. La gvidantoj faris ĉion laŭ sia ebleco. Sed restis problemoj ankoraŭ ne solvitaj — la plej grava el ili: la organiza. La bulgara esperantistaro ne organizemas. Eble genta trajto ĝi estas, eble ekonomiaj aŭ politikaj kaŭzoj ekzistas, sed la fakto estas okulpikiga: el tia abundo de esperantistoj en nia lando nur ero aniĝis en BEA! Fakto doloriga! Kaj temo atentinda por la kongreso!

Baldaŭ vi havos en manoj la raporton de CK de BEA. Vi ĝin legos kaj prijuĝos. Nun ni nur substrekas la gravecon de la proksima kongreso. Kaj alvokas al via serioza pristudo pri la pro-

blemoj en ĝi diskutotaj. Ni detenas nin de sugestoj, ni ne rekomendas antaŭe solvojn. Libere prijuĝu, libere diskutu, libere proponu! Ĉiu laŭ sia percepto. Ĉies konsilo kaj propono estos utila. Ke ĉiu alportu brikon por la sukcesa afero del kongreso!

Nun ni atentigu, ke en Stara-Zagora fervoraj samideanoj prenis ĝoje sur sin la ŝarĝon aranĝi kongreson. Cetere, ne tre ĝojiga

estas ilia laboro — ni tion konsciu kaj kuraĝigu ilin per nia aliĝo al la kongreso. Senprokraste sendu vian aliĝilon, eĉ se via partopreno ne estas certa! Ni estu dankemaj al la samideanoj en Stara-Zagora pro ilia preteco aranĝi al ni bonan kongreson!

Ni pretigu nin por la kongreso! Ĉiuj amase al Stara-Zagora!

T. K. P.

Profesoro

Théophile Cart,

la dua nia majstro, la plej fidela apostolo de Esperanto, ne plu vivas; la 21-an de Majo, j. k., matene, la morto lin forprenis de ni. Li mortis trankvile, laborante ĝis la lastaj horoj por Esperanto, 76 jara maljunulo kaj kun 30 jara agado de esperantisto. Certe, ĉiu nia leganto konas lian personon kaj signifon sufiĉe bone, ke ni en tiu ĉi malgranda funebra noto ne ripetu superflue ĝin; tamen li apartenas al la historio kaj ĝi diros sian vorton pri li, pri lia granda merito al nia movado, pri lia fidela laborado kaj zorga gardado de nia lingvo — inda prezidanto de nia Esperantista Akademio, kia li estis ĝis sia morto. La tutmonda esperantista gazetaro merite jam honoris lin okaze lia neatendita morto; ankaŭ ni per ĉi-notoj esprimas nian grandan respekton al li, lia nomo restos simbolo de vera esperantismo.

BEA

Pri nia kongreso

Kiel ni jam scilgis, nia 18-a kongreso okazos la 19—21-an de Julio en Stara-Zagora. Tuj aliĝu per la aliĝilo kiun vi ricevis kun la antaŭa n-ro de „B. E.“; se vi ne havas tian, petu de la Kongresa Komitato en Stara-Zagora (N. Vasilkov, Smetnata palata). Certigilojn por 50% veturrabato sendas nur la L. K. K. post aliĝo al la kongreso, kaj ne ni. La certigiloj validas por alveno dum 17, 18 kaj 19 VII. kaj por reveno dum 20, 21, 22 kaj 23 VII.

Ni atentigas la samideanojn ke la malnovaj membrokartoj ne plu validas, ni presigis novajn, laŭ la postulota specimeno 17-a, kaj ni jam dissendis ilin al la aliĝintaj s-toj; nur per ili (dece plenigitaj, subskribitaj kaj stampitaj) oni povas veturi.

Provizora tagordo de la kongreso

1. Malfermo de la kongreso. Gratuloj.
2. Elekto de kongresa estraro kaj de komisionoj por: 1) rajtigiloj, 2) buĝeto, 3) organo, 4) estonta agado, 5. sanĝo de la statuto, 6) rilatoj inter BEA kaj la instituto kaj BEA kaj „Balkana Konkordo“; Balkana konferenco k. a.

3. Raportoj de la CK kaj de la Kontrola Komitato de BEA, diskutoj pri ili kaj liberigo de respondeco.

4. Raportoj de la elektital komisionoj.

5. Difino de la loko de la estonta CK; elekto de novaj CK kaj KK; difino la urbon de la 19-a Bulgara Esp. Kongreso.

6. Diversaj. Fermo de la kongreso.

Rimarko: La lokoj kaj la tempo de la fakkunsidoj kaj de la ekzamenoj estos sciligataj dum la kongreso. Estas anoncitaj fakkunvenoj pri la Bulgara Esperanto-Instituto, pri la Balkana konferenco, k. a. Aranĝota intima in-

terkonatiĝa vespero kaj ekskursetoj al la belaj cirkaŭaĵoj de la urbo.

La Kongresa Komitato eldonis verdajn afiŝojn pri la kongreso; prizorgu ilian tujan disgluon en viaj lokoj. La societoj kiuj ne ankoraŭ kvitiĝis kun la LoKoKo pri la tombolo tuj faru tion; la monon sendu al Hristo Karakolev, magazeno „Bon Marŝe“, St. Zagora. La s-noj kiuj deziras prelegi ion poresperantan dum la kongreso, ankaŭ tiuj, kiuj volas partopreni la vesperamuzon per ia numero tuj sciigu tion la la LoKoKo.

:: Bulgara Esperanto-Instituto ::

I. Ekzamena Komitato

ROZO DE¹ LA TOMBO DE² HOMERO

(Коментаръ, граматически, езиковъ, синтаксовъ, логически разборъ)

Ĉiuj kantoj de la oriento³ parolas⁴ pri⁵ la amo de la najtingalo al⁶ la⁷ rozo; en⁸ la silentaj⁹ stellumaj noktoj la flugilhava¹⁰ kantisto¹¹ faras serenadon al sia bonodora¹² floro¹³.

Ne malproksime¹⁴ de¹⁵ Smirna, sub la altaj platanoj, kie la komercisto pelas¹⁶ siajn ŝarĝitajn¹⁷ kamelojn, kiuj fiere levas siajn longajn kolojn kaj peze¹⁸ marŝas sur sankta tero, mi vidis florantan¹⁹ rozarbetaĵon²⁰; sovaĝaj kolomboj traflugadis²¹ inter la branĉoj de la altaj arboj kaj iliaj flugiloj lumis²², kvazaŭ ili estus el²³ perlamoto. (sekvas)

РОЗА ОТЪ ХОМЕРОВИЯ ГРОБЪ

1. Предлогътъ „de“ показва произхождение.

2. Тукъ „de“ показва притежание (отговаря на „чий“) и се превежда съ съответния български предлогъ „на“ (на Хомера), или съ прилагателно за притежание (Хомеровъ). На есперанто отъ собственитъ имена не могатъ да се образуватъ прилагателни за притежание, защото биха се смѣсили съ прилагателни качества. На бълг. тѣзи два вида се образуватъ съ две различни на-

ставки: *Zamenhofa stilo* (качество — *Замenhoфски стилъ*); *Verkoj de Zamenhof* (притежание — съчиненията на *Замenhoфъ* — писани отъ него). Сѝщо не може да се каже „*Johana*“ за „*Ивановъ*“.

3. „*Oriento*“ означава „посоката, отъ която изгрѣва слънцето“ и „земитъ, които се намиратъ въ тази посока“. Тукъ има втората отсѣнка. Обикновено думитъ, показващи свѣтовнитъ посоки не се членуватъ съ опредѣлителния членъ, защото и

безъ това сж опредѣлени. Тука „la oriento“ значи „източнитѣ страни“, изтока. Членътъ опредѣля и схваща *всички* източни страни. вж. т. 7.

4. „*Paroli*“ означава не само „говоря чрезъ гласовитѣ си органи“, но и *informi, sciigi, temi*.

5. „*Pri*“ се поставя предъ това, що е предметъ на разговора: за, относно.

6. „*Al*“ показва посоката на действието (тука на чувството)

7. До тукъ не се е говорило за нѣкоя, или нѣкаква роза и членътъ не показва нѣщо познато. Тукъ се разбира любовта на славея къмъ всѣка една роза, къмъ розитѣ изобщо. Членътъ е употребенъ въ *родовъ* смисълъ. Сжщо: *La urso estas sovaĝa besto*.

8. „*En*“ се употребява за мѣсто и за време. Тукъ е употребено за време.

9. „*Silenta*“ означава „който не говори (*silentanta*) и „презъ чието траяне или втршене не се говори“; *Silenta homo. Silenta movo*.

10. „*Flugilhava*“, крилатъ, достатъчно ясно показва, че пѣвецътъ има крила, нѣма нужда отъ „*flugilhavanta*“! Само „*flugila*“ пѣкъ е недостатъчно.

11. „*Kantisto*“, пѣвецъ. Наставката „*ist*“ означава професия. Славеятъ не си изкарва хлѣба съ пѣене, но той постоянно пѣе и много приятно, *вещо*. Заради тази си вещина въ пѣенето той заслужава да са нарече „*kantisto*“. Бихме го докачили, ако го наречемъ само „*kantanto*“, сжщо както шивачъ не е само „*kudranto*“, какъвто може да бжде всѣки, а „*kudristo*“ — опитенъ въ занаята.

12. „*Bonodora*“ миризливо, благоуханно, благовонно, което има хубава миризма. „*Bonodoranta*“ означава „благоухаящо“, но тъй като „*bonodora*“ е всѣко „*bone odoranta*“

flogo и обратно, нѣма нужда отъ точна, но по-дълга форма.

13. „*Flogo*“ означава „цвѣтъ“ (часть на растение) и „цвѣте“ растение (*galanto, konvalo, tulipo*).

14. „*Ne malproksime*“ — „ недалечъ“ не означава „близо“ (*proksime*), сжщо както „*nebona*“ не означава „лошъ“.

15. „*De*“ показва „отстояние, разстояние“ и се превежда „отъ“. *Li veturas de Sofia al Plovdiv*. Тука „*de*“ показва отдѣляне, изходната точка, а „*al*“ — посоката, целта.

16. „*Peli*“ означава пжда, гоня и карамъ напреде си (за добитѣкъ).

17. „*Ŝarĝitajn*“ е минало страдателно причастие отъ глагола „*ŝarĝi*“ въ множествено число, винителенъ падежъ (*pasiva participa adjektivo de estinta tempo*).

18. „*Peze*“ наречие за начинъ. Отговаря на въпроса „какъ“.

19. „*Florantan*“ е сегашно действително причастие въ единствено число, винителенъ падежъ (*aktiva participa adjektivo de estanta tempo*). Употребено е като прилагателно, чиято форма притежава. Опредѣля и се отнася къмъ сжществителното „*gozarbetaĵo*“, съ което се съгласува по число и падежъ.

20. „*Rozarbetaĵo*“ розовъ храстъ; „*gozarbeto*“ би значило „розово дръвче“, което не отговаря на действителността. „*Arbetaĵo*“ значи „прилично на дръвче“, но не и „дръвче“.

21. Глаголътъ „*traflugi*“ означава кратко действие, а „*ttaflugadi*“ — продължително и многократно. „*Traflugadis*“ (означава) „прехвъркваха“, „прелитаха“, а „*traflugis*“ — прехвъркнаха, прелетѣха. Минало несвършено време се употребява при разказъ на очевидецъ, какъвто авторътъ се поставя тукъ.

22. „*Lumi*“ е глаголъ, който означава продължително действие и ми-

нало време се превежда „свѣтѣха“ (мин. несв.), Мин. вр. отъ еднократния гл. „*eklumi*“ (*eklumis*) ще се преведе съ мин. свършено: „свѣтнаха“.

II. Historia Komitato

ĉe BEI notis tri novajn periodajn eldonaĵojn:

„TRUMPETISTO“ — gazeto el jaro 1904. Redaktoro: s-ro Rjâhovski — Gara Levski. Publikigata en bulgara kaj Esperanta lingvoj kun propaganda kaj organiza enhavo. (H. K. konas nur n-rojn 2 kaj 4, kiujn al ĝi donacis s-ano Iv. H. Krestanov).

„DANUBO“ — gazeto komencanta aperadi ekde Majo 1931 jaro. Eldono

23. „*El*“ тука е поставено предъ материала, веществото, отъ което нѣщо е направено: *La tablo estas farita de la ĉarpentisto el ligno.*

S. St. H.

de esperanto-societo „Solidareco“ — Ruse. Redaktata en bulgara kaj Esperanta lingvoj kaj traktanta propagandajn kaj organizajn demandojn.

„VOJAGANTO“ — aperinta tuj post la milito en Ŝumen (1920), tre originala „gazetsistemo“; pri ĝi ni refoje pli detale skribos.

Sciigoj

— Post la XXII Universala kongreso de Esperanto 1-a—8-a de Aŭgusto en Krakovo (Pollando) okazos *postkongresoj* en Varsovio (9—11. VIII), en Bjalistok (12—13. VIII) kaj en Bndapeŝto.

Por la Kongreso en Krakovo anoncis sin tro malmultaj s-noj, pro tio ni ne aranĝos komunan pasporton kaj kavanon.

— La esperantista Balkana konferenco okazos, se povos veni s-noj el la najbaraj landoj al St.-Zagora.

— La jurnaloj „Kragosvel“ kaj „Jelezniĉarska borba“, aperantaj en Sofio, malfermis Esperanto-fakon. Ni gratulas ilin kaj koran dankon. Ĉiuj kunlaboru!

— Ĉiujn informojn pri UEA donas ĝia peranto por Bulgario: B. K. Triĉkov, „Knjajeska“ 63, Vraca. UEA, krom la malnovaj, kreis novan kategorion membroj „helpmembroj“ (hm) kiuj pagas nur 40 bulg. lv. jare. Petu de la peranto ankaŭ respond-kuponoj de UEA je prezo 10, 15 kaj 20 lv.

— La Esperanto-biblioteka en legejo „Hristo Botev“, Sofio, plene prosperis; ĝis nun kelkaj centoj da libroj estas legitaj. Do, ne vane donacis al ĝi slajn librojn la Asocio, s-anoj G. Oreŝkov kaj Z. Zahariev; pluaj samideanoj imitu ilian ekzemplon. La libroj estos bone gardataj kaj bindataj.

— Ĉe la biblioteko de BEA mankas la sekvantaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“ por posedi plenajn jarkolektojn: Jaro III (1922): №№ 2, 3, 5, 6, 8, 9, 11, 12; jaro IV (1923): 1, 2; jaro V (1924): 1, 2; jaro VI (1925): 1, 3, 4; jaro VII (1926): 11, 12; jaro VIII (1927): 6, 8, 10, 11, 12; jaro IX (1928): 2, 3, 6, 7, 8, 10, 11, 12.

Por havi plenajn jarkolektojn la Asocio bezonas la supreindikitajn numerojn. La samideanoj posedantaj tiajn estas petataj sendi al la Centra Komitato donace aŭ intersanĝe kontraŭ aliaj libroj kaj n-roj de „B. E.“

— Trandafil Trajanov, studento, strato „Moskovska“ 9, Sofio (Bulgarujo) deziras korespondi kun gesamideanoj.

KRONIKO

I. Enlanda

Varna. Sukcese finiĝis kurso ĉe la stacidomo kun 20 anoj, gvidita de Georgi Iv. Kovaĉev; 14 el la kursanoj abonis „B. E.“on.

Sofio. La 7-an de Majo la loka s-to aranĝis gajan kaj literaturan vesperon; dume estis disvenditaj multaj biletoj por la tombolo de la L. Kongresa Komitato en St.-Zagora.

Ruse. La societo aranĝas karavanon al Krakovo (Pollando) por la XXIII Universala Esperanto Kongreso. Adr.: „Prista“ 28. Aranĝata loterio.

Sevlievo. La societo „Fratiga stelo“ estas refondita la 29-an de Junio, j. k. Estraro: Doĉo T. Stanev — prezidanto, Nikola Marinov — vicprezidanto kaj bibliotekisto, Sim. St. Hesapĉiev — sekretario. Aranĝita biblioteko.

II. Eksterlanda

XIV-a Internacia Kongreso de Stenografio en Parizo, 3-7 Augusto 1931.

Esperanto estas akceptita kiel la naciaj lingvoj. Dum la XIV-a okazos:

1. Faka kunveno de esperantistoj kaj ĝenerala kunveno de la Internacia asocio de la esperantistoj stenografistoj;

2. Internacia ekspozicio de steno-

— **Lom.** Jus fondita nova esperantista s-to „Sukceso“, kiel folio de BEA. Estraro: prez. Aleks. Hr. Gavrilov, vicpr. Konst. Ĉauŝev, sekretario Iv. D. Kerimikĉiev, kasisto G. N. Gironov, bibliotekisto Sim. Il. Nenov; kontrola komisiono: Kiril Krĉstev, L. Aftalion, Vi. P. Hristov. Adr. al la sekretario: str. „Levski“ 17.

Ni ekdeziras al la nova societo sukcesan agadon.

grafio, en kiu estos speciala fako por esperanta stenografio;

3. Internacia konkurso de esperanta stenografado. Premioj.

Aŭstrio. La ĝis nun batalantaj du Esperanto-organizaĵoj jam unuiĝis en unueca „Aŭstria Esperanto-Asocio“ (AEA). Adreso: Weissenwofstr. 31, Linz a. D (Aŭstrio).

Krakovo (Marto). En Krakovo (Pollando) Esperanto-katedro ĉe la Universitato estas jus fondita. (I. E. S.)

Dortmund (Germanio). (Januaro). Esperanto estas enkondukata en a popol-alt lernejo. (I. E. S.)

Paris (Marto). La eldono 1930 de l' „Larousse Commercial“ enhavas sub la vorto „lingvoj“ artikolon pri Esperanto, ĝia simpleco, ĝia utilo por komerco, reklamo en eksterlando ktp. (I. E. S.)

Tokio (Novembro). Grupo de farmaciistoj de l' medicina fakultato de la Imperia universitato de Tokio jus publikigis Leksikonon de medikamento laŭ la japana farmakologio. Ĉi tiu leksikono estas kunmetita en 6 lingvoj, nome: Esperanto, japana, angla, franca kaj latina. (I. E. S.)

Arnhem (Novembro). La urbestro de Arnhem disponigis al la Internacia Ĉe-Instituto tutan domon kun ĝardeno. (I. E. S.)

La delonge sopirata organo de la balkanlandaj esperantistoj estas jam fakto. Ĝi jam aperas kaj ĉiu ĝia numero per si mem parolas pri la graveco de la entrepreno. Ĉu vi ne vidis ĝin ankoraŭ?

„Balkana Konkordo“ atendas vian abonpagon de 80 levoj. Ne prokrastu — tuj sendu ĝin al adreso: „Balkana Konkordo“ — poŝtkesto 233, Sofia.

El la vivo de la Konstanta reprezentaro (ko-ro) de la naciaj societoj esperantistaj

Reelektita estas la malnova estraro por tri laroj — 1930/33: prez. Henri Petiau kaj sekretario-kasisto Frans Schoofs — 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno (Belgio). La CK de BEA reelektis la malnovan peranton por Bulgario, s-ron A. D. Atanasov — Ada.

Prezentataj estas 37 asocioj el la tuta mondo, el kiuj por 1929 j. nur 8 ne pagis sian kotizon; la Bulgara Esperantista Asocio por la sama jaro

pagis 47 sv. fr. kaj rajtis 100 voĉojn la tuta enspezo de kotizoj estas 3644·80 sv. fr., elspezo 31·50 sv. fr.; resto 3613·30 sv. fr., kiu estas rekorda ĝis nun, dank al la penoj de la estraro.

Reprezentanton en la kunsido de KR en Budapeŝto ni ne havis, en Oksfordo tia estis s-no P. G. Pamporov, por Krakovo — elektota.

KR kolektis dum unu jaro 5000 sv. fr. por la Viena deficitto, speranta 10000 fr

Bibliografio

VARNA — LA REĜINO DE LA NIGRA MARO

Jus aperis en Esperanto bela, riĉe ilustrita, 32-paĝa gvidlibro tra Varna — la fama bulgara banurbo. Ĝin eldonis la Oficejo de Somerrestado (Kurortno bjuro).

Bela multkolora bildo sur la unua paĝo de la kovrilo, prezentanta la havenon kun la banejoj, allogas.

27 ilustraĵoj en la libreto montras belajn angulojn el la haveno, banejojn, la kazinon, apudmaran ĝardenon kaj belajn ĉirkaŭaĵojn de Varna: Dikili taŝ, Alaĝa monaĥejo ktp.

Landkarto montras la vojon al Varna de diversaj urboj en Meza Eŭropo. Speciala tabelo donas la vojaĝdaŭron kaj la veturpagon de la samaj urboj al Varna.

La libro estas destinita por eksterlandanoj, por diskonigi la belecon kaj ĉarmon de la bulgara Riviero.

Ekzemplerojn oni povas ricevi senpage de Kurortno bjuro — Varna.

— La membrokartoj de la veturantoj al St.-Zagora devas havi daton 3 monatojn pli fruan ol la kongreso.

LEA KANTARO,

kolekto de proletaj, batalaj, liberpensulaj kaj popolaj kantoj. Tria reviziita eldono de Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj.

Formato 10 x 15; paĝoj 74;

prezo 0·40 RM.

Malgranda kolekto de originalaj kaj tradukitaj kantoj proletaj, el kies kvin ĉapitroj al ni sonas la melodioj de multaj kantoj jam konataj en nia gepatra lingvo. Prezentitaj estas nur la tekstoj en pli malpli bona esperanto. La melodioj estas indikitaj kaj muziknotoj forestas.

La tradukintoj permesis al si strangan liberecon rilate al la akuzativo. Multloke ili kontraŭregule apostrofiŝis ĝin. Kaj formiĝis ŝokantaj versoj kiel: — Kuraĝe forpelu la malamlikan ar'! — Ill rikoltu la propran semad'! — Ĝi promesas al ni liberec' — Nuboj minacaj estingas la lum' ktp. (Pĝ: 15, 16 kaj 27). Grafike, tamen, la libro estas tre bone farita. Preso klara kaj facile legebla. Litertipoj modernaj. Kelkaj kliŝoj prenitaj el „Je la nomo de l' vivo“ ilustras la libron kaj ĝin sirmgardas bela kartonkovrilo.

Pri la enhava kaj idea valoro de l' kantoj mi ne parolos. La subtitolo klare montras tion. Do — aĉetu, legu kaj kantu!
S. M.

LIBROJ:

Dekdua Universala Kongreso de Esperanto (Oksford, 2 — 9 Aŭgusto,

1930), oficiala dokumentaro. 8-0, 140 paĝoj. Eldonas ICK, 1, Tour-de-l' Ile, Genevo.

Propono pri Mondsporttago de gimnastikdirektoro Einar Blomberg, Härnösand (Svedlando).

Bulgasa Esperant. Asocio

liveras:

la sekvantajn

lernolibrojn, lernilojn kaj esperantajjn:

	levoj
1. Lernolibro de Esperanto — de D-ro Z. Zahariev	50
2. Kurso de Esperanto por bulgaroj (sepa eldono) — de At. D. Atanasov—Ada	25
3. Esperanta sintakso por bulgaroj — de Zah. Zahariev	22
4. Praktika gramatiko	3
5. Konversaciaro	5
6. Anekdotaro	10
7. Esperanto konkeros la mondon — de D-ro D. Gavrijski (bulgarlingva)	12
8. Ĉu estas ebla kaj necesa internacia lingvo — de Prof. D-ro Iv. D. Ŝiŝmanov	4
9. Kongresparoladoj de Zamenhof — ĉiu po	2
10. Portreto de Zamenhof	10
11. Himno de Esperanto	2
12. Ŝercoj kaj incitoj	50

Por mendoj pli ol 100 lv. ni rabatas 20%. Ĉe malgrandaj: ĝis 100 lv. oni aldonu 10% por afranko kaj sendkostoj. Ĉiam nur *antaŭpage!*

Sumojn sendu perpoŝtmandate al:
BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
Poŝtenska kutija 233 — Sofia.